FN PER ANC 47

n° 180 MAJO 1994

# ESPERANTO
# NORMANDA BULTENO

**unuiĝo de normandaj esperantistoj**

Redaktas: Pierre QUILLAUD 16, rue Lt Vaisseau Paris
76120 LE GRAND-QUEVILLY Tél. 35 69 66 09
Abon-Kotizoj: 45 Frankoj. Union des Espérantistes de Normandie
CCP 283 - 40 H ROUEN

## *AĈA VETERO SED.....*

## *SUFICE BONA KUNVENO !*

Dimanĉe matene, 10an de Aprilo, ni rendevuis por antaùplanita pieda promenado tra malnovaj stratoj de Rouen. Ni celis plezurigi eksterurbanojn konigante al ili vizitindan kvartalon de nia urbo.

Sed ve !!! ni promenis nur kvarope en malvarma kaj malseka atmosfero. Ĉar pluvombreloj ne sufiĉis, ni ofte haltis en preĝejoj kiuj estis multaj dum nia irado: Sankta Vivien, Sankta Hilaire, Sankta Maclou kaj la Katedralo ŝirmis nin de pluvo. Tamen ne kredu ke ni partoprenis kongreson de Katolika Esperanto Asocio !!!

Granda estis nia plezuro retrovi antaù liberserva restoracio Flunch niajn geamikojn el Le Havre kun kiuj ni dekope agrable tagmanĝis, babilis (ne krokodilante). Varma loko, bona etoso kaj manĝoj laù ĉies gusto kaj monujo . Ŝajnas ke tiu formulo plaĉis al ĉiuj .

Post tagmanĝo, ni piediris al ĉambrego de "Halle aux Toiles" kie ni malfermis Ĝeneralan Kunvenon de Unuiĝo de Normandaj Esperantistoj (aù pli moderne kaj pli efike dirite :Esperanto-Normandie) antaù trideko da partoprenantoj. Tio estis bona okazo retrovi amikojn de longe neviditajn.

Prezidanto POTTIER legis sian moralan raporton kaj mi komentis financan raporton . Mi ankaù raportis pri nia Normanda Bulteno. Post tiuj raportoj okazis vigla debato kun dikutendaj demandoj : "Ĉu la areo de nia Unuiĝo de Dieppe ĝis Avranches ne estas tro granda ?" kaj eĉ :"Ĉu nia Unuiĝo estas necesa ? Ĉu intergrupa ligilo ,- sen asociaj strukturoj -,ne sufiĉus ?" Tio estis opinio de Yves NICOLAS kiu jam skribis en nia Bulteno de Marto 1992 : "Nia Unuiĝo ne plu ekzistas kiel arigo de unuopuloj, sed kiel senstruktura reto de grupoj en vasta (tro ?) regiono ... Ni adaptiĝu al tiu situacio . Ni ne plu perdu niajn fortojn por vivigi fantomon . Ni konstruu fortajn lokajn grupojn . Ni propagandu por ke ĉiu estu membro de naciaj kaj internaciaj asocioj..."

Ĉeestantaro opiniis ke ni devas plidaùrigi nian asocion kaj aprobis unuanime raportojn .

Tamen estis problemo por renovigi estraron ; malgraù alvoko al kandidateco, neniu kandidatiĝis skribinte al Prezidanto. Ni do alvokis kandidatojn dum la kunveno: nur unu novulo sin prezentis : Samideano Michel PETIT ( Eto) el Le Neubourg (27) kiu jam estas aktivulo el Esperanto - 95 .Pierre Pottier, Jean Gibaux, Sylvie Caron kaj mi akceptis ... rekandidatiĝi.

Ĉiuj estis elektitaj kaj nova (?!?) estraro konsistas do el:

| | |
|---|---|
| Prezidanto : | Pierre POTTIER |
| Sekretariino: | Sylvie CARON |
| Kasisto-Bultenisto : | Pierre QUILLAUD |
| Membroj : | Jean GIBAUX |
| | Michel PETIT |

Elektitoj akceptis tiun nomumon kondiĉe ke venontjare okazu efektiva renovigo. Do, ĉiuj jam bone pripensu tion !

Estraro de Esperanto-Normandie kunvenos dum junio kaj decidos pri estontaj agadoj.

Tio estis la fino de Ĝenerala Kunveno de Union des Espérantistes de Normandie sed poste kunvenis ankaù membroj de Normanda Federacio de UFE kaj membroj de Groupe Esperanto Region Rouennaise.

*NORMANDA FEDERACIO DE UFE* (Esperanto-France) : ĉiuj ĉeestantoj (UFE-anoj) konsiderinte ke por Esperanta agado de UNE kaj Normanda Federacio estas simila kaj eĉ identa akceptis proponon ke estraranoj de UNE kaj de Federacio (Prezidanto, Sekretario,kasisto) estu la samaj personoj (kondiĉe ke ili estu UFE-anoj). Do Pierre Pottier daùre prezidos la Federacion, Petro Kijo prizorgos kontojn kaj Sylvie Caron sekretarios.

*GROUPE ESPERANTO REGION ROUENNAISE* :Tiu grupo estis aktiva antaù kelkaj jaroj kaj organizis multajn esperantajn aranĝojn :Normanda Rendevuo, staĝoj, Krizalid-teatraĵo, ekspozicioj, perkorespondaj kursoj, ktp...Bedaùrinde, pro manko de respondeculo, ĝi endormiĝis.
Pro manko de kandidato, ĉeestantoj decidas malfondi tiun grupon.Aktivaĵoj esperantistaj tamen daùros en la regiono nome de la sekcio Rouen/Quevilly de UNE.Monhavo estos ĝirata al UNE.

Petro KIJO

*************************************************************************

## NUN LA KASISTO :

En antaùa bulteno,aperis listo de kotizintoj por jaro 1993 .Bonvolu aldoni jenajn nomojn : Gesinjoroj : Dufossé, Jourdaine, Lemarchand, Loison.

Jen listo de kotizintoj por jaro 1994 :
Gesinjoroj : Angenault, Artus, Bataille , Berlot, Bessiere, Canu, Caron, Claudel, Couture, Defrance ,Dufossé, Duhamel, Gibeaux, Giordano, Guéroult, Guerre,Guilmot, Haulard, Helbert, Huet, Jourdaine, Jouvin, Langanay, Larchevesque, Lebrun, Legros, Lemarchand, Loison, Martin, Masseron, Maurice, Mendès, Michaud, Millet, Moyon,Nicolas, Noel, Nordin, Ordonaud, Peltier, Petit, Pilet, Pottier, Quillaud, Quillet, Robiolle, Roblin, Rubin, Sery J., Sery S., Stevens, Tailpied, Turmel..

Mi atendas la kotizojn de tiuj kies nomo ne estas en ĉi-supra listo.

## AGADRAPORTO DE LA PREZIDANTO

Jam de pluraj jaroj, nia asocio havas gravajn problemojn. En 1988, ni devis nuligi la kongreson kiun ni projektis en Veules les Roses pro ne sufiĉa nombro da aliĝoj kaj ni tiel perdis la koston de rezervitaj lokoj.

Ni organizis ĝeneralan kunvenon en Yvetot en 1989 kun pli ol 30 partoprenantoj kaj alian en Hérouville en 1990 kun 35 personoj. Sed tiu kunveno estis la lasta ĉar ni devis denove nuligi la preparadon de ĝenerala kunveno planita por okazi en LeHavre en 1991 ankaù pro nesufiĉa nombro da aliĝoj.

Aliaj problemoj ekzistas en nia asocio : multaj grupoj nur vivetas aù eĉ mortis pro maljuniĝo de ĉefaj respondeculoj kaj manko da novuloj; sendkostoj de bulteno car poŝto ne konsideras ĝin kiel gazeton ; manko da artikoloj por plenigi la bultenon ktp...Ĉiuj-ĉi kialoj , kaj certe multaj aliaj kaùzas malpliigon de nia anaro.

Pro tio ni kunvenas hodiaù por pridiskuti tiujn problemojn kaj serĉi solvojn.

Kompreneble, nia komitato jam pripensis la aferon kaj ankaù submetos al vi ideojn por ke ni pridiskutu ilin ĉiuj kune. Sed ni ankaù esperas ke kelkaj el vi faros al ni sugestojn por revigligi nian asocion kaj eĉ ke kelkaj kandidatiĝos por ke nia malnova kaj maljuniĝanta komitato cedu la lokon al novuloj, plenaj je interesaj ideoj !

Tamen, nepre ne konsideru ke Esperanto mortis en Normandio . Tute male, kelkaj grupoj kaj unuopuloj multe laboris diversmaniere por divastigo kaj instruado de la lingvo , akcepto de eksterlandanoj, el kiuj kelkaj faris privatajn aù publikajn prelegojn, artikolojn en ĵurnaloj, informajn kunvenojn , radio-elsendojn ktp...,rebatojn post malfavoraj gazetartikoloj. Kaj ni ne forgesu ke la grupo en Hérouville Saint Clair organizis la grandiozan kongreson de SAT-Amikaro pasintjare kun helpo de nia komitato. Tio montras ke ekzistas aktivuloj en Normandio .Ni devos pripensi , kiel helpi al ili , kaj tio estos la ĉefa temo de nia kunveno.

Pierre POTTIER

*Tiu raporto estis legata de nia Prezidanto dum la ĝenerala kunveno . Pri la diskutoj kaj decidoj kiuj ĝin postsekvis legu la pagojn 1a kaj 2a.*

*******************************************************************************************

**HORS DES SENTIERS BATTUS**
**(Témoignage autobiographique)**
************

**Ce livre de 100 pages , en français , relate la vie d'une vieille espérantiste idéaliste. (Prix approximatif de 100 Francs)**

**S'inscrire chez l'auteur : Jane LAURENT**
**5 Rue de la forêt**
**39700 SERRE-les-MOULIERES**

## NORMANDOJ PARTOPRENIS LA KONGRESON DE SAT AMIKARO

Tradicie , SAT Amikaro kongresas dum Paskaj feriaj tagoj. Ni memorigas al vi ke lastan jaron la kongreso okazis en nia provinco en Hérouville.

Ĉi-jare, ĝi okazis en apuda provinco ANĴUO en famkonata kastelo Grezijono de la 2a ĝis la 4a de Aprilo 1994 . La ĉi-jara temo estis : "Kiel ebligi al la komencantoj transiri plej rapide kaj profite al praktika aplikado de Esperanto ?" 180 kongresanoj ĉeestis inter kiuj kelkaj eksterlandanoj : Nederlandanoj, Germanoj, Belgoj, Anglo, Ĉinino kaj unu Ĉeĥo organizanto de venonta SAT Kongreso en Stražnice.

Kongreso estas bona okazo retrovi geamikojn en agrabla etoso. Organizintoj de tiu kongreso renkontis malfacilaĵojn car ili organizis ĝin de Parizo ; tamen dank'al helpo de Petro kaj Dominik BABIN , respondeculoj de Kultura Esperanto Domo, ĉio iris glate.

Plej multaj estis jam vizitintaj la kastelon kaj revidis ĝin kun granda ĝojo. Por tiuj kiuj vidis ĝin unuafoje ni diru : "revenu en la kastelon kiam vetero estos pli bela" ĉar dum la kongreso la pluva malvarma vetero malebligis ĝui ĉirkaŭan belnaturan parkon. Sinjoro Babin insistis ankaŭ ,-prezentante la kastelon-, por ke multaj partoprenu staĝojn, kursojn kaj kulturajn aranĝojn organizatajn ĉiujare. La Kultura Domo ne ricevas subvenciojn. Nurajn enspezojn alportas staĝanoj.

Mi ne komentos la kutimajn laborkunsidojn dum kiuj respondeculoj prezentis siajn raportojn pri la vivo de la asocio : Kleriga fako, libro-servo, perkorespondaj kursoj, revuo, inform-kaj-rebatservo, kaso, ktp...Oni voĉdonis por elekti komitatanojn. Longa kaj malfacila diskuto okazis por scii kiu grupo organizos venontjaran kongreson. SAT Amikaro organizis de kelkaj jaroj plensukcesajn kongresojn kun multaj ĉeestantoj. Ŝajnas ke ĝi nun estas viktimo de siaj sukcesoj. Plimultiĝis kongresanoj sed ne la nombro da aktivuloj.

Dum tiuj kongrestagoj, multe ŝvitis niaj normandaj geamikoj ( malgraŭ malvarma vetero) ĉar ili laboris trapasante ekzamenojn.

Ni havis okazon admiri, foliumi kaj aĉeti librojn ĉe la Libro-Servo. Infanoj povis ĝui sian propran "kongreseton" dum plenaĝuloj aktivumis. Interesaj prelegoj okazis ĉiuvespere.Komencantoj povis partopreni konversacian kurson.Kiel kutime, estis frakcikunvenoj kaj fotado antaŭ la kastelo.

Pro ne sufiĉa granda ĉambrego en la kastelo, la oficiala malfermo de kongreso okazis en urba salono de apuda komunumo St Martin d'Arcé. Ankaŭ tie okazis la distra vespero kun folklora grupo. Mi ne komentos tiun spektaklon car mi jam estis survoje revenante al Rouen. Marde tuttaga ekskurso kondukis kongresanojn al distilejo Cointreau kaj al Angers kie ili vizitis mezepokajn restaĵojn de la urbo kaj la faman kastelon.

Mi esperas ke SAT Amikaro sukcesos organizi venontjare sian 50an kongreson kaj mi incitas niajn normandajn geamikojn ne preterpasi tiun okazon por perfektiĝi en lingvosciado , miksante turismajn plezurojn kaj amikecan etoson.

Petro KIJO

## FINANCA RAPORTO

Pro tio ke ni ne kunvenis dum 3 jaroj la kontoj koncernas la jarojn 1991,1992,1993 :

| ENSPEZOJ | | ELSPEZOJ | |
|---|---|---|---|
| Ce Poŝta konto la 5an-10 1990 | 4643,79 | Bultenoj de N°170 gis N°177 | 4209,63 |
| Kotizoj | 8470,00 | Sekretario-poŝto | 77,50 |
| Profito de SAT-Amikara Kongreso en Hérouville | 2500,00 | Diversaĵoj | 325,00 |
| | | | 4612,13 |
| | | ĉe CCP la 31an 12- 1993 | 11001,66 |
| | 15613,79 | | 15613,79 |

Noto: Meza prezo de 1 bulteno estas: 530 F .
La kontoj estas kontrolitaj de Pierre JOUVIN . Li kontrolis ankaù la kontojn de GERR kies monhavo (1554,30 F)estos ĝirata al UNE
***************************************************************************************************

# NOVAĴOJ DE NIAJ GRUPOJ

**YVETOT**

: De unu jaro, nia grupo malfortiĝis pro seninteresiĝo de kelkaj anoj . Unu el la ĉefaj estraranoj , Sro Saunier mortis antaù kelkaj monatoj . Estas neniu kurso pro manko de lernantoj sed konversacia rondo okazas la 1an kaj 3an ĵaùdon de ĉiu monato de la 17a gis la 18a horo .

Ni faris iom da propagando per gazetoj , per informkunveno pri la temo :"kiu lingvo por Eùropo ?" kaj per 4 radioelsendoj (2 ĉe Radio-Solaris kaj 2 ĉe Radio-Fraternité ) ; ĉiu el ili daùris 1 horon.

Ni presigis turisman faldfolion en Esperanto pri Yvetot. Ni ankaù akceptis eksterlandajn gesamideanojn : iu Danino kiu faris publikan prelegon pri sia lando kun traduko en la francan ; iu Rusino kiu ankaù parolis pri sia lando en la grupo kaj iu Jugoslavo kiu prezentis al la grupo sian libron pri Serba parola literaturo en Mezepoko. Sro Pottier helpis per Esperanto Rùenanon hungardevenan retrovi kontaktojn kun sia Hungara familio. Li ankaù skribis al diversaj gazetoj aù radioj por gratuli ilin aù , male , por defendi Esperanton.

**ROUEN / GRAND QUEVILLY** :12 Gesamideanoj partoprenas konversacian rondon ĉiuĵaùde en Centre Socioculturel de Grand Quevilly de 17a 45 gis 19a30 Poste okazas unuagradakurso kun 3 lernantinoj.
2 partoprenis SAT Amikaran kongreson en Grezijono.
3 partoprenos SAT kongreson en Stražnice kaj antaù-kongreson en Prago
2 partoprenos Universalan Kongreson en Seulo.
Niaj grupanoj bone komprenis ke Esperanto valoras kiam oni gin praktikas !

**FECAMP** : Mouloud kaj Taous partoprenis la 7an kaj 8an de Majo amikan renkontiĝon "Normandie-Bretagne" en Cavan (Côtes d'Armor) .La temo estis :"Découvrir la méthode RIK à travers et pour l'Espéranto". Annette et Gérard de grupo Grand Quevilly ĉeestis ankaù tiun amikan renkontiĝon.

**VIRE** : Oni informis nin ke Sinjoro Lemazurier forpasis sekve de cerba hemoragio. Ni kondolencas liajn familianojn kaj amikojn. Ni memorigas ke antaù unu jaro mortis ankaù Sinjoro Legret.

**HEROUVILLE SAINT CLAIR** : 4 Grupanoj ĉeestis SAT Amikaran kongreson

**ALIAJ NORMANDAJ GRUPOJ** : La redaktoro plendas ke li ne ricevis informojn !!!

**JOGO-ESPERANTO GRUPO de Grand-Couronne (76):**La sekcio Jogo de Grand Couronne vivigata de Annette Bataille posedas sian esperantan grupon .Antaù 2 jaroj, Chantal Millet partoprenis esperantan kongreson en Litovio. Si ligis tie amikajn rilatojn kiuj ĵus konkretiĝis per vizito de delegacio el litova urbeto Vilkaviskis situanta sude de Vilnius, la ĉefurbo, proksime al Polio.
Grava vizito , car tie estis la prezidanto kaj la vicprezidanto de la distrikto kie troviĝas Vilkaviskis , reprezentanto pri kulturaj fakoj, profesorino pri franca lingvo (tradukistino) : sume 6 personoj venintaj de Litovio por 3-taga vizito en Grand-Couronne.
Tiuj Litovoj ne estis alvenintaj kun malplenaj manoj . Ili kunportis specimenojn pri sia loka meti-arto (potaroj, korboplektaĵoj, puntaĵoj , statuetoj el ligno) .La loka joga grupo organizis ekspozicion en "La Orangerio"pri tiuj objektoj aldonante tien poŝtkartojn, planojn, librojn pri Esperanto kaj Litovio, turismajn dokumentojn kaj faldeblaĵojn. Video-filmo estis prezentita al ĉeestantoj dum akcepto donacita de urbestraro , montrante admirindajn vidaĵojn de iu lando kiun malmultaj homoj estas malkovrintaj.

La urbestro, Sro Bernard Frau, estis kontentega akcepti tiun litovan delegacion kaj li gratulis la organizintojn de tiu operacio, la jogan sekcion kaj ĝian esperantan grupon.

La respondeculo de la litova distrikto vigle dankis Grand Couronne pro ĝia varma akcepto kaj li donis kelkajn detalojn pri la socialaj instalaĵoj , administraj kaj ekonomiaj , de sia lando . La ceremonio pli amika ol oficiala finiĝis per transdono de la urba skarpo el Vilkaviskis al la urbestro de Grand Couronne kaj al la prezidantino de la joga sekcio.

Antaù ili foriro el Francio, la 6 Litovoj estis denove akceptitaj en la urbodomo kie gastronomiaj paketoj estis donacitaj al ili por ilia reveno .

*Tiu artikolo aperis franclingve en jurnalo "PARIS-NORMANDIE "la 2an de Majo 1994.* Ĝi estas tradukita esperanten de

Marie-Line Jourdaine

Jen plej bona maniero elmontri vivantecon kaj utilecon de Esperanto antaù publiko kaj oficialuloj .

*************************************************************************************

La PAPO uzis Esperanton okaze de sia tradicia paska mesago " Al la urbo kaj la mondo" (urbi et orbi) .Tio estis la 55a kaj antaù lasta lingvo antaù la pola.

**ELECTIONS EUROPEENNES** Article proposé par Esperanto-France (UFE)

**********************************

## L'UNION EUROPEENNE DU GACHIS AU BON SENS !

*Electeurs européens! Futurs députés à Strasbourg !*

Qui osera s'attaquer à la barrière des langues ? Qui exigera un débat démocratique sur le statut des langues dans les institutions européennes ?

Ceux qui , en paroles , prônent le multilinguisme nous acculent en fait à étudier l'anglais ... pour mal le maîtriser.La position d'infériorité où cette politique nous place est incompatible avec notre dignité.
Le programme Lingua ne résout rien . Comment un Danois sachant l'allemand et l'anglais communiquera-t-il avec un Grec ayant choisi l'italien et le français ?
La bureaucratie européenne traduit 3,6 millions de mots par jour , chacun de ces mots nous coûte 2 francs . Et des milliards manquent pour des activités socialement utiles !

Surmonter toutes ces difficultés , est-ce la quadrature du cercle ? Non , il existe une solution peu coûteuse , démocratique, psychologiquement agréable , celle qu'a préconisée Umberto Eco : l'Espéranto .
Les comparaisons faites sur le terrain entre cette formule et les systèmes rivaux (anglais, interprétation simultanée, etc...) concluent à la grande supériorité de la première . Ceux qui le nient n'ont jamais comparé les divers systèmes dans la pratique ; ils perdent ainsi toute crédibilité . Et ceux qui présentent l'Espéranto comme nuisant à la connaissance des langues trompent leur public : l'expérience prouve qu'il stimule l'intérêt pour les autres idiomes et en accélère l'acquisition.

Exigeons la solution la plus efficace et la plus respectueuse de toutes les cultures . *Demandons qu'une commission d'enquête parlementaire rende ( et publie ) un rapport comparatif sur les budgets, les coùts et l'efficacité des solutions en présence* . Ne votons que pour des candidats conscients, aussi, des problèmes linguistiques et opposés à la discrimination dont l'Espéranto fait l'objet !

Que nos candidats n'oublient pas les 250 millions de citoyens qui ne seront jamais polyglottes , et voudraient bien , eux aussi, à leur exemple , communiquer pour fraterniser . A moins qu'à l'imitation de certains dictateurs , on tienne à les empêcher de se comprendre ... en réservant cela à une élite

***************************************************************************************

Un livre indispensable pour parfaire vos connaissances et pour trouver des arguments face aux sceptiques et aux détracteurs de l'Espéranto :
De Claude PIRON:
**LE DEFI DES LANGUES** **Du gâchis au bon sens**
336 Pages 170 F +18 F de Port soit un total de 188 F
à commander à ESPERANTO FRANCE
4BIS RUE DE LA CERISAIE 75004 PARIS

## ESPERANTO-LITUANIE

*************************

Le yoga est une recherche intérieure qui doit ouvrir sur la Connaissance, sur l'Action . Le groupe de Grand-Couronne a choisi l'ESPERANTO comme moyen d'agir , de connaître, de se relier . C'est le but de la rencontre qui a eu lieu du 25 au 29 Avril dernier, avec un groupe de Lituaniens.

Une exposition ESPERANTO-LITUANIE présentée à M. le Maire, à la Municipalité et aux habitants de Grand-Couronne, le mercredi 27 Avril, a permis de montrer toutes les possibilités d'utilisation de la Langue Universelle et fait prendre conscience que la pratiquer , c'est dépasser nos particularités réciproques : Etre plus que Lituaniens et Français , Etre conscient d'appartenir au village TERRE.

La Lituanie est bordée par la mer Baltique, a des frontières avec la Russie, la Pologne, la Bielorussie ,la Lettonie . Après 50 ans d'absence , elle s'ouvre à nouveau vers l'Europe. Les Lituaniens sont parmi les peuples indo-européens les plus anciens. Leur langue est la langue vivante la plus proche du sanscrit .

Les délégués de ce pays qui nous ont rendu visite habitent la ville de Vilkaviskis, située au sud de Vilnius la capitale. Six personnes composaient le groupe : le Président et le Vice-Président du district , un représentant des affaires culturelles, un professeur de Français, un Espérantiste organisateur de la rencontre et le chauffeur.Ils sont venus avec des objets de leur artisanat -poteries, vanneries, dentelles, statuettes en bois -et un film présentant leur pays.

Durant 4 jours, ils ont découvert la vie de famille française , Grand-Couronne, ses services municipaux et le fonctionnement d'une commune ; parcouru Rouen de jour et de nuit -panorama de la Côte Ste Catherine-, "fait du shopping"(butikumis) et réalisé un rêve : visiter PARIS - la Tour Eiffel, les Champs-Elysées, l'Arc de Triomphe, Montmartre...

Voir sa ville, sa région, Paris avec le regard d'un autre peuple, c'est apprécier ce qui nous semble ordinaire . C'est trouver extra-ordinaire ce qui nous entoure, *c'est Etre présent au monde ICI et Maintenant .*

Annette BATAILLE
Responsable du groupe Yoga

******************************************************************************************

**CU RIDINDE AU PLORINDE ?** *Monsieur Yves Berger Directeur Littéraire des éditions Bernard Grasset a répondu à un espérantiste de Chambéry :*
*"(...) Tenir l'Espéranto pour une langue est une aberration. Le signe d'un dérangement mental. Une preuve de débilité. Vouloir, en outre remplacer le français par l'espéranto est criminel. J'espère bien qu'une loi va passer qui punira ceux qui attentent en pensée et par écrit à la langue française. Elle vous infligera une peine que l'on pourrait formuler ainsi : Condamné aux travaux forcés du silence à perpétuité . Avec une peine incompressible de 100 ans.*
*Avec mes plus mauvais sentiments."*

******************************************************************************************

Al ĉiuj , ni deziras **Agrablajn Feriojn**.Praktiku Esperanton dum viaj libertempoj. <u>Kaj ne forgesu sendi artikolojn</u> al la redaktoro por plenigi venontan bultenon!